

István Szerdahelyi:

LULLUS KAJ LA FILOZOFIA LINGVO

Ĉu la verkaro de Lullus estas konsiderebla kiel semiotika modelo, nomata «filozofia lingvo» aŭ laŭ alia termino «apriora lingvo»? Por respondi al tiu demando unue estas fiksenda la signifo de tiuj ĉi du terminoj.

La termino «apriora lingvo», kvankam jam enradikiginta en la interligvistika literaturo, ŝajnas esti ne tute oportuna. Ĝi ŝajngas, kvazaŭ tiu sistemo estas konstruita «antaŭlingve» aŭ «eksterlingve». Sed ĉiu semiotika modelo deiras de la homa lingvo, ĉiu model-konstruanto pensas lingve sekve: ĉiu modelo, ankaŭ la t.n. «apriora», estas modelo de la homa lingvo. Do tiaj difinoj, laŭ kiuj la aprioraj lingvoj ne baziĝas sur iu/j lingvo/j estas falsaj, kaj tute ne estas akceptebla tiu difino, laŭ kiu apriora estas tiu lingvo, «kiu ne similas al iu etna lingvo». Sekve: estas serĉendaj aliaj kriterioj por ĝuste difini la terminon «apriora lingvo»-aŭ pli ĝuste «filozofia lingvo».

La lingvo estas la baza semiotika sistemo, el kiu deriviĝas ĉiuj aliaj semiotikaj sistemoj kaj kiuj estas interpreteblaj nur en la homa lingvo mem. La generadon de certaj semiotikaj sistemoj postulas certaj bezonoj, kiuj — kvankam ilia kontentigo povencie enestas en la lingvo mem — fakte aŭ ŝajne ne estas sufiĉaj. Tio signifas, ke ĉiu konstruanto de iu lingva modelo deiras el la kritiko de la lingvo.

Ekz.: la neces-bezono fiksi tempe la lingvon naskis la skribon. La postulo sekvi sinkrone la akustikan tekston skribe naskis la stenografion, la neceso transformi la skribon je luma, flaga aŭ telegrafa kodo naskis la Morsan alfabeton, ebligi la «legadon» al blinduloj — la Brajlan sistemon, ekskludi la neinicitojn el la interpreto de la skribo — la kriptografion, fine, ebligi la internacian skriban komunikadon — la pazigrafiojn.

Ĉiu filozofio — esprimate aŭ ne — estas samtempe ankaŭ iaspeca kritiko de la lingvo. La filozofo, strebante al la kreo de «la sicenco de sciencoj», bezonas tian lingvon, per kiu oni senmanke povas ekkoni kaj priskribi la universalan realaĵon. En tiu klopodo la filozofo rimarkas, ke en la homaj lingvoj inter la signo kaj signifo estas breĉoj, mankas la adekvateco kaj en la kombiniĝo la gramatika sintakso ne sekvas adekvate la logikan pens-trajektorion. Sekve oni konkludas, ke la unuopaj lingvoj estas mankaj, neperfektaj, ne taŭgaj por iliaj celoj. La celo de projektanto de filozofia lingvo estas krei idealan, perfektan, universalan lingvon, kies ĉefaj karakteriziloj estas:

1. la enciklopedio, t.e. la inventaro de ĉiuj koneblajoj;
2. la diserigo de la kompleksaj ideoj je simplaj kaj la konstruo de la alfabeto de simplaj ideoj;
3. al tiuj ideoj alroĉi adekvatan signon, realigante la perfektan homomorfismon, t.e. la perfektan kongruon inter la signo kaj signifo;
4. la signo — kvankam konvencia — devas esti ĉiam motivata: t.e. konante la sistemon el la signo oni povu rekte dedukti la signifon;
5. ĉiu signo estu facile kombinebla kaj ĉiunivela kombino (morfemika aŭ sintaksa) devas strikte sekvi la logikajn leĝojn tiel, ke la pensado transformiĝu je kombinatoria kalkulado per la signoj;
6. la ĉefa celo estas koniva; tamen ĉiam ĉeestas ankaŭ kiel sekundara celo: la komunikacia. Ĝuste tio transformas la puran formalan kodon je «lingvo»;



Lullus komprenis, ke la Eklezio devas anstataŭigi la krucmilitojn per la amo. Antaŭulo de misiistoj, li enŝipiĝis por konigi Kriston al Afrikaj muzulmanoj. Bildo el 14-jarcenta manuskripto Karlsruha.

7. el la celo kaj karaktero de la modelo sekvas:
- a) socia implico — la universalisma koncepto;
 - b) mnemonika principo — preskaŭ ĉe ĉiu filozofia lingvo-projekto troviĝas aludo al ĝia facila ellerneblo.

La aposterioristo kritikis la lingvon el tute alia optiko: ĉar li pensas en pure praktikaj-pragmatikaj kategorioj, celante solvi la sociajn problemojn, kaŭzatajn de la diverslingveco, oni kritikis la etnajn lingvojn pro ilia nereguleco, malfacila alproprigeblo, ligiteco al certa etno k.a. Sekve oni celas konstrui regulan, facile alproprigeblan elastan sistemon, neŭtralan internacian help-/pont-lingvon. En la aposterioraj sistemoj la signoj estas arbitraj kaj nemotivataj, la rilato inter signo kaj signifo ne estas rigore adekvata (kvankam pli ol en la historie elformiĝintaj lingvoj), la gramatikaj reguloj ne kongruas al la logikaj (kvankam la grado de ilia reguleco estas multe pli alta, ol tiu de etnaj lingvoj).

Se ni komparas la Lullus-an sistemon al tiuj du model-tipoj tuj evidentiĝas, ke la aposteriora tipo estas tuj ellasebla (Lullus ja konsideris taŭga por tiu funkcio la latinon).

Sed komparante lian sistemon kun la kriterioj de la filozofia lingvo evidentiĝas, ke preskaŭ ĉiuj elementoj enenstas en la Lullus-a verkaro, krom la celdifino (ĉe Lullus misiisma). Tamen ĝi ne formas koheran tuton: tiuj elementoj estas disigitaj en pluraj verkoj kaj neniam kunorditaj en unueca sistemo, konsiderebla «lingvo». (Ekzistas tamen opinioj, laŭ kiuj la sistemo kontentigas tiun postulon: «La scomposizione dei concetti composti in nozioni semplici e irriducibili, l'impiego di lettere e di simboli per indicare le nozioni semplici, la meccanizzazione delle combinazioni tra i concetti operata per mezzo delle figure mobili, l'idea stessa di un linguaggio artificiale e perfetto (superiore al linguaggio comune a quello delle singole scienze)» (Rossi v.c., pĝ. 46).

En la enkonduko ni citis la opinion de Prantl, laŭ kiu Lullus havas nek antaŭulojn, nek posteulojn en la historio de sciencoj. Pri la antaŭuloj ni jam parolis. En la sekva parto ni volas demonstri, ke malmultaj scienculoj de la 13-a/14-a jc. havis tiom grandan influon en la plej diversaj sciencaj medioj, kiel ĝuste Lullus, kaj ke en interlingvistiko Lullus tutprave estas konsiderebla kiel la deir-punkto, eĉ se ne en tiu senco, kiel oni konsideris lin ĝis nun.

*EI SERTA GRATULATORIA, in honorem
Juan Régulo (La Laguna, 1985)*



ic reuq
mas? ŝi
o ad' ex
n' dedit
anq' mō
a' fā' p'ap
d'raa'is

